

LA ESPERO

ORGAN FÖR ESPERANTO-
RÖRELSEN I SVERIGE

UTGIVEN AV GEFLE
ESPERANTOFÖRENING

Officiellt organ för Svenska Esperanto-Förbundet (S. E. F.) och Norvega Esperantista Ligo (N. E. L.)

Redaktör — redaktoro: R. PEHRSSON, 3-23,
Gävle, (Svedujo).

Ansvarig utgivare — responde eldonanto kaj
administranto: W. WAHLUND, Gävle, (Svedujo).

N:o 4.
April 1915.

Prenumerationspris — abonprezo: i Sverige
1:20 kr., i Norge 1:60 kr., eksterlande 1:— Sm.
(1:82 kr.).

Lösnummer 10 öre.
Annonpris — anoncprezo: 5 öre pr mm.

Ett gott uttal.

I. Språkljuden.

Om vi bara fästa oss vid vårt eget modersmål, så veta vi, i fråga om uttalet, att detta är i betydande grad olika hos exempelvis en skåning, en gottlänning, en sörmlänning, en dalkarl o. s. v., utan att dessa behöva tala s. k. landsmål eller sträva efter ett dialektiskt färgat uttal. En dalkarl hör genast, att den andre icke är dalkarl, och han hör därjämte, från vad landsände den talande är. Men de första varandra fullkomligt.

Så ställer sig saken alltså när det gäller esperantister från olika länder. Tungomålet är detsamma, och de samtalande esperantisterna förstå varandra alldeles utmärkt. Men olikheter i uttal kunna lätt märkas — och anmärkas. Särskilt hos personer som icke alls eller blott föga sysslat med främmande språk.

Det finns emellertid ett mönsteruttal, som varje bildad svensk strävar att följa, även om detta ej alltid är klart fattat.

Även esperanto har ett dylikt mönsteruttal, för att nu använda detta uttryck. Och såsom det förhåller sig med allting annat i detta språk, är även uttalet en sak som man med stöd av »Fundamento» kan sluta sig till, resonera sig till.

Fundamento säger: »Varje ord uttalas precis så som det står skrivet.» Detta kan i sin ordning uttryckas så, att varje bokstav betecknar alltid ett och samma ljud. Om stavelsen är betonad eller obetonad inverkar ej väsentligt på uttalet. Även vo-

kalerna, om dessa var för sig verkligen alltid beteckna ett och samma ljud, måste uttalas lika i betonad som i obetonad stavelse, framför annan vokal som framför en eller framför flera konsonanter. Att ett ljud skulle ena gången uttalas utpräglat kort och andra gången utpräglat långt, stämmer icke väl överens med den logiska regelbundenhetens princip. En konsonant kan alltså inte ibland uttalas dubbel, d. v. s. som förlängt konsonantljud, utan måste alltid höras lagom kort utan överdrift. Samma gäller vokalerna; de uttalas icke släpande långa i betonad öppen stavelse, såsom svenskarna vanligen äro benägna för, utan så att skillnaden mellan betonad och obetonad stavelse i detta hänseende i möjligaste mån jämnas ut. Om vi utgå från ordet »planto», så torde om dess rätta och goda uttal icke råda någon tvist. Tas t'et bort, så bör ju återstoden uttalas precis med behållet uttal för) vart och ett av ljuden, varför »plano» får ett kortare (och något öppnare) a än i svenska »plan». Likaså om n'et tas ifrån, så bibehåller uttalet från »pla(n)to». Men det får inte bli »platto»! Utan t'ets korthet bibehålles. Jämför vidare »farti» och »far(t)i», »par(t)o».

Vad beträffar ordet »verki», så kan det ju inte gärna uttalas på mer än ett sätt. Då två uttal på »e» ej får anses logiskt, och »verki» näppeligen kan uttalas utan att e-ljudet får en viss ä-färg, så måste vi anse som det normala, att denna ä-färg finnes med alltid i esperantos e. (Jämför i obetonade stavelser: »perfidi», »persisti», »pejzago», o. s. v. Då vi alltså ha »verki», så ha vi även »ve(r)ki» och »ver(k)a» med alltjämt samma

bibehållna uttal på de kvarstående ljuden; så »perdo» och »per(d)o», varpå rimma »vespero», »ofero», »afero», »somero», »fero», »tero». På samma sätt ha vi »tenti» och »ten(t)i», »penti» och »pen(t)i» och »pe(n)ti», »ven(t)o» och »ve(n)to», »hejmo».

Vad angår bokstaven »i», så lyder den samma lag, nämligen att bokstaven är alltid tecken för ett och samma ljud. Om en svensk esperantist följer sina från svenskan ingrodda språkvanor och alltså talar esperanto med svenskt uttal, så förefaller honom t. ex. »min» och »knabin» vara ett fömligen dåligt rim, ehuru det med ett riktigt esperantistisk uttal är ett fullt och helt och oklanderligt rim, ty i »min» blir i-et ej så kort och n-et ej så långt som i svenskans till utseendet lika ord; »knabino» å sin sida uttalas aldrig med svenskans släpande långa »i», utan som om man tänkte sig »knabin(d)o», (d. v. s. som hette ordet »knabindo» och d'et fölle bort utan att något förändrades i uttalet av det övriga). Så »skribi(n)ta»; »nia» rimmar ej väl på det svenska »nia», utan ungefär på sista biten av »Kristiania»; »historio» har alltså ett något kortare »i» än i svenskan, vilket riktiga uttal betydligt modererar verkan av accentens flyttning från näst sista till sista stavelsen.

Vilket normalljud bokstaven »o» representerar, finna vi lätt av sådana ord som »korpo», »korko», »porco», »zorgo» o. d., desslikes »monstro», »respondo» o. s. v., jämförda med uttalet i obetonade stavelser såsom »zorganto», »korpuso», »horloĝo». Som det riktiga »o»-uttalet torde man alltså få anse det något öppna i »korp», d. v. s. utan s. k.

»läpprundning», (karaktäristiskt för svensk långt å samt än mer för o och u, hos vilka senare denna läpprundning är så stark, att läppställningen blir precis densamma, som då man blåser ut ett ljus). Det faller av sig självt, att vokalljudet i »koro» är precis detsamma som i »korpo», likaså »ko(r)ko», »mon(str)o», »mon(tr)o» o. s. v.

Uttalet av det esperantistiska »u» måste av svenskar och norrmän särskilt inövas, ifall de icke förut ha lärt något främmande språk; skola de efter esperanto lära sig något dylikt, så ha de denna inövning undanstökad och alltså ett besvär mindre, ty detta ljud förefinnes i alla språk utom svenskan och norskan. Denna »läpprundning», som vi nyss talade om, finns inte hos det esperantiska u, redan däri skiljer det sig väsentligt från det svenska »o» i »bonde». Varken det svenska »frukt», det esp. »frukt'» eller det svenska »kukt» rimma på varandra, men närheten mellan de båda senare torde vara betydligt större än mellan de båda förra. Som »turko» så »tu(r)ko», som »turto» så »tu(r)to», som »grandulmo» så »grandul(m)o», som »ok ulnoj» så »okuloj» o. s. v. Det latinska »perdita» har tonvikten på första stavelsen därför att i'et är kort, det esperantiska dotterordet har tonvikten på mellersta stavelsen, men därmed har ingalunda i'et blivit i svensk mening långt. Men ej heller t'et får uttalas långt, så att ordet komme att rimma på svenskt hitta och sitta, vilket ej går an.

Det mönstergilla uttalet på r är tungspets-r. Men den som ej förmår frambringa annat än tungspens-r blir naturligtvis inte osalig för det, fastän jag inte precis vet, hur han skall kunna för åhöraren göra begriplig åtskillnad på »monarho» och »monaho». — I svenskan har tungspets-r sammansmält med »tungljuden» d, t, n och s till nya ljud (liksom sj och sk i sjön och skön) t. ex. jord, bort, barn, förs. Toge man med detta uttal i esperanto, så vore detta icke blott ologiskt utan även opraktiskt, enär man därmed gjorde dylika ord obegripliga för den främmande åhöraren. Som naturligt är uttalas varje bokstav för sig och med sitt eget, alltid ena och samma ljud, utan sammanblandning och förvandling. Den som inte är van vid att säga »kvartal» annat än med det svenska uttalet rt, tror ej att något annat går för sig, men man måste komma ihåg sig i syn-

nerhet i början att icke »bryta» på sitt modersmål vid talandet av esperanto. Därför: ler-ni, lor-no, lor-do, kvar-to, kur-teno, mer-lo, dor-so, kur-so o. s. v. med tydligt r plus vederbörlig konsonant, liksom i fer-mi, korvo o. s. v. Samma regel, eller rättare sagt samma logik gäller sådana ord som »dankas, mankas, punkto, lango, lingvo» o. d., där n uttalas som n och ingenting annat, och g som g. (Något ng-ljud känner esperanto som bekant icke.)

Sådana ljud som ĉ och ĝ vilja svenskar gärna uttala för tunna, på den grund att de ifråga om dem liksom ock ifråga om ŝ och ĵ ej bilda dessa ljud med framskjuten underläpp, vilket är fel.

Detta några påpekningar angående ett s. k. mönsteruttal av esperanto. Till ett gott uttal hör först och främst en god portion sunt förnuft; med det kommer man betydligt längre och närmare målet, än med pedanteri och hårklyverier. Det finns någonting som heter uttalslättnader, olika i olika språk — i esperanto kan man naturligtvis ej dra in dylika ginvägar från modersmålet; men å andra sidan bör man icke onödigtvis försvara uttalet för sig genom en alltför kantig och skrovlig tillämpning av reglerna. Som sagt, man kommer i den vägen längre med sunt förnuft än pedanteri.

Paul Nylén.



Konstgjort språk

Du får kryddor till din mat, som hämtats med ångbåt från Indien, dina kläder innehålla bomull från Amerika, du röker en havanna och dricker java-kaffe, åker i automobil, telefonerar, telegraferar, har elektriskt strykjärn och gaskök, använder tandkräm, champoneringspulver och gilettklinga (eller kanske ännu mera raffinerade toalettmiddel), din päls är från Sibirien och din klocka från Schweiz. Och du rynkar på näsan åt ett konstgjort språk!

E. B.



Bär Esperantostjärnan!



Esperantos framtidsprogram:

Esperanto meddelelsemedel vid samtal med utlänningar, användbart för alla som ha folkskolebildning.

Esperanto universellt affärsspråk Esperanto internationellt vetenskapligt språk.

Esperanto förmedlare av kännedomen om skönlitteraturens standardverk genom översättningar, avsedda för dem, som ej ha tillfälle att tillägna sig originalspråket.

Esperanto ett gott underlag för undervisningen i språk och allmän grammatik.

E. B.



Några samvetsfrågor till läsaren.

Har du reflekterat över, vilken roll språkmotsatsen spelat som orsak till konflikter och hat? Har du tänkt över vilken roll språkmotsatsen spelat som medverkande orsak till nu pågående världskrig?

Har du försökt göra dig ett begrepp om vilken omständighet det är, som gjort tusen och åter tusen språkligt okunniga emigranter till hjälplösa offer för vita slavhandlare och andra blodsugare?

Kan du bestrida att ett språk som är lätt att lära sig och som är neutralt skulle kunna ha sin uppgift som främjare av såväl fredstanken som andra mänsklighetens livsintressen?

Är du ej skyldig dig själv och mänskligheten att också dra ditt strå till stacken? Du är för gammal, säger du. Du har din tid strängt upptagen och kan ej stjäla tid och krafter från dina närmaste uppgifter. Nåväl. Det kan vara sant. Men är du också för fattig för att kunna stödja dem som äro unga och ha tid och krafter att offra? Har du ej en slant att offra som din lilla andel i det arbete, för vilket hundratals människor i olika länder utan tvekan offra nästan all sin lediga tid, nästan all den kraft, som förvärsarbetet lämnar dem övrig?

E. B.

Esperanto i Sverige.

Stockholm. — Stockholms Arbetares Esperantoförening hade den 11 april sitt årsmöte. Års- och revisionsberättelserna godkändes och den avgående styrelsen erhöll ansvarsfrihet för sina handlingar under det gångna året. En liten ändring i stadgarna beslutades. Den nya styrelsen har följande sammansättning.

Ordf. Herr W. Herbst (omvald);
Vice ordf. Herr G. Hedberg (omvald);
Skr. » John Johansson (omvald);
Vice sekr. » Gusten Johansson (nyvald);
Kassaman » O. M. Carlsson (omvald).
Revisorer blevo hrr A. Milton (omvald) och G. Lagerman (nyvald).

På förslag av hr John Johansson beslöt klubben efter en kort diskussion att ansluta sig till S. E. F. (Svenska Esperanto-Förbundet). »La Esperos» garanti-bevis voro även föremål för behandling och beslöt föreningen uttala sin sympati för tidningens åtgärd och att understödja densamma.

En rysk meningsfrände, hr G. Touriansky från Odessa, bevisade mötet och uttalade i ett livfullt anförande sin glädje över att vara i stånd tack vare esperanto att deltaga i en sammankomst av svenskar.

Joĉjo.

Två offentliga föreläsningar om Prag och Böhmen ha på den senaste tiden ägt rum i Stockholm; den ena i Folkets Hus, den andra i »Eriksalongen»; talare har varit hr Teodor Rosengren, sekreterare i esperantoföreningen »Verda Stelo».

Den 12 april talade hr Rosengren ånyo offentligt vid ett möte anordnat av den kulturella föreningen »Birkagården» i huvudstaden över ämnet »En resa genom Schweiz och fotvandring i högalperna». Birkagårdens högtidssal var alldeles fullsatt. Det intressanta föredraget belystes av en mängd vackra, fängslande ljusbilder. Utgående från Basel, beskrev talaren sin resa söderut med besök i talrika städer och platser. Vid beskrivningen av besöket i Bern, lämnade talaren en livlig skildring av IX världsesperantokongressen, humoristiskt berättade han om de esperantistiska utflykterna under kongressen. En utmärkt propaganda för esperanto! En skratteexplosion blev det då talaren berättade om sina äventyr på floden Aare, om utfärder till alptopparna tillsammans med meningsfränder från alla land. Från Bern fortsatte resan söderut till Genève och Genève- och Thunalsjöarne, sedan förbi främlingscentrat Interlaken till högalperna, med fotvandring på de snötäckta alptopparna Jungfrau, Eiger, Mönch, Wetterhorn k. fl. — Publiken var förtjust och det entusiastiskt framförda föredraget belönades med tacksamma applåder.

Mefistofeles.

Borås. — Borås Esperantoförenings årsmöte ägde rum den 8 febr. Av den framlagda årsredogörelsen framgår, att föreningens verksamhet varit livlig, ehuru kriget i hög grad minskat intresset. Kriget har emellertid även visat nödvändigheten av ett internationellt hjälpspråk och föreningens ordförande hade varit i tillfälle att vid olika tillfällen hjälpa esperantister i de krigförande länderna. — En kommitté tillsattes för att utreda frågan om hur medlemmarnas intresse för språket skall höjas.

Esperanto en Svedujo.

Stockholm. — La Stockholma Laborista Esperantogruppo havis la 11-an de aprilo sian jarkunvenon. La jar- kaj reviziaj raportoj estis aprobataj kaj la eksiĝanta estraro ricevis deŝarĝon pri siaj faroj en la pasinta jaro. Malgranda ŝanĝo en la statutaro estis decidata. La nova estraro havas la jenajn kunigon:

Prez. S-ro W. Herbst (reel.);
Vica prez. S-ro G. Hedberg (reel.);
Skr. » John Johansson (reel.);
Vica sekr. » Gusten Johansson (novel.);
Kasisto » O. M. Carlsson (reel.).
Resiziantoj fariĝis s-roj A. Milton (reel.) kaj G. Lagerman (novel.).

Laŭ propono de s-ro John Johansson la klubo decidis post mallonga diskuto aliĝi al S. E. F. La garantilotoj de »La Espero» estis ankaŭ objekto de pritraktado kaj decidis la klubo elparoli sian simpatian al la faritajo de la gazeto kaj subteni ĝin.

Rusa samideano, s-ro G. Touriansky el Odessa, ĉeestis la kunvenon kaj elparolis per vigla paroladeto sian ĝojon esti kapabla dank' al esperanto partopreni kunvenon de svedoj.

Joĉjo.

Lastatempe okazis en Stockholm du sukcesplenaj publikaj paroladoj pri Praha kaj Bohemujo; la unua en la »Domo de la Popolo», la dua en »Eriksalongen», parolanto estis s-ro Teodor Rosengren, sekretario de »Verda Stelo».

La 12-an de aprilo s-ro Rosengren laŭ invito ree publike paroladis en kunveno aranĝita de la kultura asocio »Birkagården» en la ĉefurbo pri la temo »Vojaĝo tra Svisujo kaj piedirado en la altalpoj». La festa salono de »Birkagården» estis tute plena. La interesa parolado estis ilustrata de multo da belegaj, admirindaj lumbildoj. Komencante de Basel, la parolanto priskribis sian vojaĝon suden kun vizitoj en multaj urboj kaj lokoj. Priskribante la viziton en Bern la parolanto donis viglan priskribon de la IX universala esperantokongreso. humorplene li rakontis pri la esperantistaj ekskursoj dum la kongreso. Bonega propagando por esperanto! Rida eksplodo okazis, kiam la parolanto rakontis pri siaj aventuroj en la rivero Aare, pri ekskursoj al la alppintoj kune kun ĉiulandaj samideanoj. De Bern la vojaĝo daŭriĝis suden ĝis Genevo kaj la Geneva kaj Thuna alplagoj, poste preter la fremdulan centron Interlaken al la altalpoj, kun piedirado sur la neĝkovritaj alppintoj de Jungfrau, Eiger, Mönch, Wetterhorn k. a. — La publiko estis tute ravita kaj la entuziasme farita parolado estis rekompenkata per dankaj aplaŭdado.

Mefistofeles.

Borås. — La jarkunveno de la »Klubo Esperantista de Borås» okazis la 8-an de februari. El la jarraporto montriĝas, ke la klubo vigle laboris, kvankam la milito multe malgrandigis la intereson. Tamen la milito ankaŭ montris la necesecon de internacia helplingvo kaj la prezidanto de la klubo havis okazon fari diversajn servojn al esperantistoj en la militantaj landoj. — Komitato estis elektata por esplori la demandon kiel plialtigi la intereson de la membroj por la lingvo.

Norrköping. — Den 11 mars hade föreningen »La Esperanta Stelo» i st. för den ordinarie »konversationsaftonen» en liten festtillställning. Den förnämsta punkten på programmet var en esperantisk teaterpjäs: »Ett äventyr i Japan», skriven av herr Leander Tell. Pjäsen mottogs med sådant intresse, att den även uppfördes följande söndag inför en talrik publik.

Norrköping. — La 11-an de marto la societo »La Esperanta Stelo» havis anstataŭ sia ordinara »konversacia vespero» malgrandan feston. La ĉefa punkto de la programo estis esperanta teatraĵo: »Aventuro en Japanujo», skribita de s-ro Leander Tell. La ludajo estis akceptata kun tia intereso, ke ĝi estis prezentata ankaŭ la dimanĉon poste antaŭ granda publiko.

XI Esperanto-världskongressen till San Fransisko.

Enligt meddelande från San Francisco kommer årets esperantistiska världskongress att hållas i San Francisco, då kriget lagt hinder i vägen för dess hållande i Edinburg, såsom förut var bestämt. Tiden är densamma som för den »Tutpacifika Esperanta Kongreso», som de amerikanska esperantisterna ämnat avhålla i samband med den pågående världsutställningen, d. v. s. den 22—29 augusti.

En reklambroschyr om utställningen har redan utkommit på esperanto.

Broschyren, liksom även alla upplysningar om esperanto-kongressen, kunna erhållas från kongresskommittén, adress endast: »*Esperanto Kongreso*», San Francisco, U. S. A.



En donation till esperantorörelsen.

Genom förmedling av vår värderade samideanino fröken Ester Beckman i Skara ha vi haft den stora glädjen mottaga från herr Oscar Ekman i Bjärka-Säby en gåva av kr. 200.—, att användas i propagandamål. Vår hönör för den ädle givaren!

Gefte Esperantoförening.



La vera felico konsistas en tio: *aspiri por akiri ion*, ne en akiro de io, diras la saĝulo.

Viro klopodanta por akiri la lastan tramvagonon vespere scias pli bone!

Trad. S. E. Ch.

Obligatorisk undervisning i Esperanto

er infört ved »Städtisches Friedrichs-Polytechnikum» i Köthen (ogsaa skr. Cöthen), Anhalt. Inden hver av de 10 akademisk-praktiske specialskoler som denne institution omfatter, er esperanto tillagt 1 time i det første eller oftest de to første av de 7 semestre som skolens kursus er beregnet paa. Undervisningen sker dels ved forelæsninger, dels ved praktiske øvelser, det sidste særlig hvor det gjelder esperantohandelskorrespondence (esperanto som handelsfag er gammel nyhet nu).

Av skolens program for vintersemesteret 1914—15, velvillig tilsendt os av den nuværende lærer i esperanto, hr. Hermann Mangelsdorf fra Magdeburg, ses at sprogundervisningen videre omfatter latin og græk for ingeniører, teknisk engelsk och teknisk fransk samt — under »almendannende fag» — forelæsninger over tysk, engelsk og fransk literatur.

H. B.



Stöd vår sak!

Detta kan ske helt enkelt 1) genom att prenumerera på tidningen »La Espero» (kr. 1:20) vilket bäst sker genom postanvisning. 2) genom att inbetala avgift för medlemskap i Svenska Esperantoförbundet (kr. 2:—).*) 3) genom att bli medlem i någon esperantoförening på din ort, om sådan finnes där. 4) genom att teckna en eller flera andelar i tidningen »La Esperos» garantifond (pr st. 5 eller 50 kr.) Som tidningens spridning årligen ökats, så kan det ju hända, att det sistnämnda inte blir någon allmosa utan en kapitalplacering. 5) genom att bidraga till vår tidnings spridning eller stödja den genom annonser.

E. B.

*) Då La Espero erhålles gratis.

Sur la hebrea tombejo en Praha.

Ne donu florojn kaj rubandojn ofere sur la ripozej'.
La vivo donis ne girlandojn, sed ŝtonojn. Ŝtonojn donu ni!

La patroj agis tiel, pelitaj el land' al land' kun hont' kaj ve', kaj tra jarcentoj ne viditaj sentante daŭron de l' sufer'.

Ĉe lok' de dorm' de lacigito pro longa ir' sur karda voj'; kie haltis kor' de l' turmentito de homa mok' kaj propra plor',

somerpromesoj ne instigu la pacon atingitan jam.
Per floroj tombojn ne beligu, nek per verdaj'. Konvenas ŝton'.

Laŭ Oscar Levertin.



Per esperanto.

De nia samideano s-ro Carl Winberg en Bengtsfors ni antaŭ kelka tempo ricevis interesan leteron, en kiu li preparolas, kiamaniere li dank' al esperanto povis instrui blindan najbaron en la t. n. Braila reliefa skribo.

La viro, kiu perdis sian vidon nur antaŭ unu kaj duona jaro, estas tridekjara kaj tial opinias sin tro maljuna por povi lerni la punkt-skribon. Dum vizito en Kopenhago dum la pasinta jaro (dum la intencita sed interrompita vojaĝo al la »Deka» en Parizo) s-ro Winberg renkontiĝis kun la redaktoro de la porblindula gazeto »Esperanta Ligilo», s-ro Thilander kaj lia kunlaborantino fraŭlino Höjer, de kiuj li ricevis ideon pri la »Braila» sistemo. Reveninte hejmen li decidis utiligi kion li lernis kaj ricevis inte el Anglujo esperantan lerno-

libron en la blindskribo, li unu tagon komencis la instruon kun la neatendite bona rezultato, ke la blindulo jam en la sama tago povis, malgraŭ tre provizoraj rimedoj, skribi preskaŭ kion ajn per la punktskribo.

Tiel nia samideano havis la gojon, povi dank' al esperanto ĵeti radion de lumo en la vivon de malfeliĉa homo.

Rpm.



Post la Granda Milito.

Alvoko al la diplomattoj.

De D-ro L. L. Zamenhof.

(Aliaj gazetoj bonvole represu!)

Terura milito ekkaptis nun preskaŭ la tutan Eŭropon. Kiam finiĝos la grandamasa reciproka buĉado, kiu tiel forte malhonoras la civilizitan mondon, kunvenos la diplomattoj kaj penos reordigi la rilatojn inter la popoloj. Al vi, al tiuj estontaj reordigantoj, mi nun min turnas.

Kiam vi kunvenos post la plej ekstermanta milito, kiun iam konis la historio, vi havos antaŭ vi eksterordinare grandan kaj gravan taskon. De vi dependos, ĉu la mondo havu de nun fortikan pacon por tre longa tempo kaj eble por ĉiam, aŭ ĉu ni havu nur kelktempan silenton, kiun baldaŭ denove interrompos diversaj eksplodoj de intergentaj bataloj aŭ eĉ novaj militoj. Pripensu do frutempe kaj tre zorge vian taskon, ĉar nun, kiam por via laboro estas oferitaj multaj centmiloj da homaj vivoj kaj milionoj da tre malfacile akiritaj homaj bonstatoj, vi havos sur vi tre grandan moralan respondecon. Zorgu do, ke via laboro ne estu sencela kaj senfrukta kaj ke post la fino de viaj laboroj la homaro povu diri: ni ne vane alportis la grandegajn kaj terurajn oferojn.

Ĉu vi komencos simple referadi kaj flikadi la karton de Eŭropo? Ĉu vi simple decidis, ke la terpeco A devas aparteni al la gento X kaj la terpeco B al la gento Y? Estas vero, ke tian laboron vi devos fari; sed ĝi devas esti nur negrava parto de viaj laboroj; gardu vin, ke la referado de la karto ne fariĝu la tuta esenco de viaj laboroj, ĉar tiam viaj laboroj restus tute senvaloraj kaj la grandegaj sangaj oferoj,

kiujn la homaro alportis, restus vanaj.

Kiom ajn vi volos kontentigi la popolojn, kiom ajn justaj vi penos esti kontraŭ diversaj gentoj, vi nenion atingos per referado de la karto, ĉar ĉiu ŝajna justeco koncerne unu genton estos samtempe maljusteco koncerne alian genton. La nuna tempo ne estas simila al la tempo antikva; sur ĉiu disputebla peco da tero laboris kaj verŝis sian sangon ne unu gento, sed ankaŭ aliaj gentoj; kaj se vi decidis, ke tiu aŭ alia terpeco devas aparteni al tiu aŭ alia gento, vi ne sole ne faros agon justan, sed vi ankaŭ ne forigos sur tiu terpeco la kaŭzon de estonta batalado. La »liberigo«, kiun vi donos al tiu aŭ alia terpeco, estos nur sofismo, ĉar ĝi signifos nur, ke al tiu aŭ alia gento vi donos la rajton esti sur tiu terpeco mastroj super homoj de aliaj gentoj, kiuj ankaŭ tie naskiĝis, laboris kaj sufiris kaj havas koncerne sian patrujon la samajn naturajn rajtojn, kiujn ĉiu infano havas koncerne sian patrinon. Estas vero, ke tiu gento, kiun vi privilegias, entuziasme krios: »Vivu la diplomattoj!« kaj se tiu gento sur la koncerna terpeco prezentos la plimulton, ĝi per teroro silentigos la aliajn, kaj ĉiuj gazetoj en la mondo diros, ke »la tuta loĝantaro de la terpeco A sentas sin tre feliĉa... Sed tio estos mensogo, simpla mensogo, kiun la mondo ne komprenos nur pro tio, ke la ĝemado de la terore silentigitaj prematoj, de homoj, kiuj en sia patrujo fariĝis »fremduloj«, ne venos al ĝiaj oreloj.

Transdonante ian terpecon al la homoj de tiu aŭ alia gento, vi ĉiam faros maljustaĵon kontraŭ aliaj homoj, kiuj havas la samajn naturajn rajton, koncerne tiun terpecon. La sola efektive justa decido, kiun vi povas fari, estas: laŭte proklami kiel oficialan, firme interkonsentitan kaj plene garantiitan decidon de ĉiuj Eŭropaj regnoj la sekvantan elemente naturan, sed ĝis nun bedaŭrinde ne observatan principon:—

Ĉiu lando morale kaj materiale plene egalrajte apartenas al ĉiuj siaj filoj.

Tio estas, ke en sia privata vivo ĉiu civitano en ĉiu regno havas plenan rajton paroli tiun lingvon aŭ dialekton, kiun li volas, kaj konfesi tiun religion, kiun li volas; ke se en la institucioj publikaj estas uzata unu sola regna aŭ loka lingvo, tio estas nur poroportuneca cedo de la malplimulto al la plimulto, sed

ne humiliga tributo de gentoj mastrataj al gento mastranta. Ĉar la gentaj nomoj, kiujn portos ankoraŭ multaj regnoj kaj provincoj, estas la ĉefa kaŭzo, pro kiu la loĝantoj de unu supozata deveno rigardas sin kiel mastrojn super la loĝantoj de alia supozata deveno, tial ĉiu regno kaj ĉiu provinco devas porti ne la nomon de ia gento, sed nur nomon neŭtrale-geografian.

Plej bone estus, se anstataŭ diversaj grandaj kaj malgrandaj Eŭropaj regnoj ni havus iam proporcie kaj geografie aranĝitajn »Unuigitajn Ŝtatojn de Eŭropo«. Sed se nun estas ankoraŭ tro frue, por paroli pri tio, oni devas almenaŭ per oficiala kaj interkonsentita akcepto de la supre dirita principo forigi tiun grandegan malbonon, tiun senfinan fonton de konstantaj bataloj, kiun prezentas la identigado de lando kun gento.

Kiam la supre dirita principo estos oficiale fiksita per garantiita decido de ĉiuj Eŭropaj regnoj, tiam malaperos la ĉefa kaŭzo de militoj kaj de konstanta reciproka timado kaj senfina armigado, ĉar tiam oni jam neniam kaj nenie povos diri, ke »la patrujo estas en danĝero«. Oni scias ja tre bone, ke la vortoj »patrujo en danĝero« ne signifas, ke iu volas deŝiri parton de nia patrujo kaj ĵeti ĝin en la maron, aŭ ke iu volas rabi por si la havon de ĝiaj loĝantoj, sed plej ordinare tiuj vortoj signifas simple: »Minacas danĝero, ke sur ia terpeco, kie ĝis nun mia gento estis mastro kaj aliaj homoj estis nur pli aŭ malpli tolerataj, morgaŭ eble alia gento fariĝos mastro kaj mia gento estos nur tolerata.

Kiam en la tuta Eŭropo regos politika justeco absoluta, t. e. natura, ĉie kaj por ĉiuj egala, kiam en ĉiu lando ĉiuj loĝantoj estos morale kaj materiale plene egalrajtaj, kiam la landoj ne portos plu gentajn nomojn, kiam la regna lingvo ne havos plu karakteron genteŝovinisman kaj humiligan kaj ne ekzistos plu gentojmastroj kaj gentoj-servantoj—tiam ne ekzistos plu kaŭzo por intergentaj militoj; tiam ĉiu homo povos sidi tute trankvile en sia natura, sole vera kaj sincere amata patrujo, li ne bezonos plu timi, ke iu povas »forpreni« ĝin de li, kaj li ne bezonos revii pri forpreno de la patrujo de aliaj homoj.

Mi scias tre bone, ke la malamo inter la gentoj ne malaperos subite, en unu tago, kian ajn aranĝon la diplomattoj farus. Sed por tio poste

laboros jam personoj *privataj*, per predikado, edukado, al kutimigado, k. t. p.; de vi, diplomatoj, ni atendas nur, ke vi donu al ni la *eblon* tion fari. Reciproka malamo inter la diversaj gentoj de la homaro ne estas io natura, kiel ne estas natura ia reciproka malamo inter la diversaj familioj de unu gento: la malamon kaŭzas nur—krom la facile forigebla reciproka nekomprendo kaj nekonado—la ekzistado de gentoj premantaj kaj gentoj premataj, la blinda egoismo, fiereco kaj kalumniemeco de la unuaj, la natura reagemeco de la lastaj. Estas facile interfratigi homojn liberajn kaj egalrajtajn, sed estas nefareble interfratigi homojn, el kiuj unuj rigardas sin kiel rajtajn mastrojn super la aliaj.

Se vi eĉ farus nenion alian, *se vi nur forigus la gentajn nomojn de la landoj* (afero tre facile farebla), vi jam farus per tio agon eksterordinare gravan, vi kreus novan eron en la historio de Eŭropo. Ĉar en lando kun neŭtrala nomo la tute natura plena egalrajteco de ĉiuj ĝiaj loĝantoj pli aŭ malpli frue nepre estos atingita, sed en lando kun nomo genta la egalrajteco neniam estos plena kaj daŭra, ĉar la malfeliĉa nomo ne sole kvazaŭ pravigos la plej malnoblajn intergentajn maljustaĵojn en la diversgentaj landoj de la orienta Eŭropo, sed eĉ en landoj pli civilizitaj ĝi ĉiam konfuzos la kapojn eĉ de la plej honestaj civitanoj, subtenante en ili ĉiam la opinion kaj senton, ke la lando apartenas nur al tiu gento, kies nomon ĝi portas, kaj ĉiuj aliaj gentoj estas en ĝi nur fremduloj. Eĉ ĉe la plej bona volo la civitanoj de tiu lando ne povas al kutimiĝi al la ideo, ke ili ĉiuj prezentas unu nacion, ĉar por tia nacio simple ne ekzistas *vorto*, kaj, demandite pri tio, al kiu popolo li apartenas, la loĝanto de tia lando pro manko de tiu *vorto* estas *devigata* nomi ian *genton*; kaj ĉi tiu devigata konstanta kalkulado sin al ia speciala gento anstataŭ al la komuna nacio de la lando forte subtenas la gentan ŝovinisman kaj malpacon inter la samlandanoj.

Resumante ĉion, kion mi oiris, mi ripetas:

Kiam post la fino de la milito kunvenos la diplomatoj, ili povos fari ŝanĝon en la karto de Eŭropo; sed tio ne devas esti ilia *ĉefa* laboro. Ilia *ĉefa* laboro devas esti: starigi en la nomo kaj sub la garantio de siaj registaroj pli-malpli la sekvan-
tan leĝojn:—

1. Ĉiu regno apartenas morale kaj materiale al ĉiuj siaj naturaj kaj naturigitaj loĝantoj, kian ajn lingvon, religion aŭ supozatan devenon ili havas; neniu gento en la regno devas havi pli grandajn aŭ pli malgrandajn rajtojn aŭ devojn ol la aliaj gentoj.

2. Ĉiu regnaro havas plenan rajton uzi tiun lingvon aŭ dialekton, kiun li volas, kaj konfesi tiun religion, kiun li volas. Nur en la institucioj publikaj, kiuj ne estas destinitaj speciale por unu gento, devas esti uzata tiu lingvo, kiu per komuna interkonsento de la regnaroj estas akceptita kiel lingvo regna. En tiuj publikaj institucioj, kiuj havas karakteron speciale lokan, anstataŭ la regna lingvo povas esti uzata alia lingvo, se ne malpli ol 9/10 de la urbanoj donis por ĝi sian konsenton. Sed la lingvo regna aŭ urba devas esti rigardata ne kiel humiliga tributo, kiun ŝuldas gentoj mastrataj al gento mastranta, sed nur kiel propravola poroportunece cede de la malplimulto al la plimulto.

3. Pro ĉiuj maljustaĵoj, farataj en ia regno, la registaro de tiu regno estas responda antaŭ Konstanta Tut-Eŭropa Tribunalo, starigita per interkonsento de ĉiuj Eŭropaj regnoj.

4. Ĉiu regno kaj ĉiu provinco devas porti ne la nomon de ia gento, sed nur nomon neŭtrale-geografian, akceptitan per komuna interkonsento de ĉiuj regnoj.

Sinjoroj, diplomatoj! Post la terura eksterma milito, kiu starigis la homaron pli malalten ol la plej sovaĝaj bestoj, Eŭropo atendas de vi pacon. Ĝi atendas ne kelktempan interpaciĝon, sed pacon konstantan, kiu sola konvenas al civilizita homa raso. Sed memoru, memoru, memoru, ke la sola rimedo, por atingi tian pacon, estas: forigi unu fojon por ĉiam la *ĉefan kaŭzon* de la militoj, la barbaran restaĵon el la plej antikva aŭtaŭcivilizacia tempo, *la regadon de unuj gentoj super aliaj gentoj*.

D-ro L. L. Zamenhof.



»Vi måste fortsätta att sprida upplysning om fredsrörelsens idéer bland folket. En stor olägenhet är den i fråga om språket. Ett internationellt språk är en absolut nödvändighet.»

Felix Moscheles,
»fredsrörelsens fader».

La Esperos garanti-fond.

Följande andelar ha till dato teeknats i den garantifond för »La Espero», vartill vi i föregående nummer av tidningen utfärdade inbjudan:

Elias Beckman, Gefle	5:—
Ester Beckman, Skara	5:—
Gustaf Jönsson, Bomhus	5:—
Brynjulf J. Klingenberg, Kristiania	10:—
Otto Roesel, Borås	50:—
Oscar Sandblom, Myrekulla	5:—
W. Wahlund, Gefle	100:—
Caroline Wieslander, Förslöf	50:—
A. K. Örn, Gefle	10:—
Klubo Esperantista, Kristiania	60:—
A. Liljemark, Gefle	5:—
R. Pehrsson, Gefle	5:—
Frans A. Olsson, Gefle	10:—
Einar Adamsson, Gefle	5:—

S:a Kr. 325:—

Att bildandet av denna garantifond på sina håll mottagits med förståelse och intresse bland La Esperos läsare, framgår av de skrivelser, som föreningen fått mottaga med anledning av densamma, och varur vi tillåta oss göra ett par utdrag. Fru Caroline Wieslander ger i följande enkla och varmhjärtade ord sitt erkännande:

— »Mi tre deziras en mia malgranda grado kunhelpi vian laŭdindan laboron vivteni nian gazeton, kaj mi esperas, ke multaj aliĝis al via alvoko. Mi estas maljuna virino kaj malnova erperantisto — de 1896 — kaj mi treege amas nian aferon kaj interesigas por ĝia sukceso.

Kore kaj samideane
Caroline Wieslander.»

Och ordföranden i Borås Esperantoförening, s-ro Roesel, skriver bland annat:

»— — Estas konata fakto, ke organo (gazeto) estas la plej efika rimedo kunligi la anojn, konservi la intereson por la afero kaj disvastigi la aferon mem. Tial ni ĉiuj devas kunhelpi, ke la daŭra ekzistado de nia gazeto »La Espero» estos garantiita. — — Mi esperas, ke la fidelaj membroj tie ĉi — kiel en la aliaj lokoj de sveda Esperantujo — alportos sian parton al la entreprenado, por ke ĝi sukcesu kaj ebligu la pluan eldonadon de nia ŝatata gazeto. — — —

Ni ĉiuj esperu, ke vi ne laciĝos, sed daŭrigos vian laboron redakti kaj eldoni nian karan gazeton; ni aliaj volas kaj devas laŭpove, almenaŭ ekonomie, subteni vin. — — —

Via *Otto Roesel*.

Till dem som ŝalunda skyndat att giva vart foretag sitt stöd, uttala vi härmed ett hjärtligt tack, i det vi samtidigt uttala vår förhoppning, att de som hittills ställt sig avvakande, nu skola följa det goda exemplet.

Gefle Esperantoförening.



S. E. F.

Inbetalda årsavgifter:

Klubo Esperantista de Stockholm för 5 medlemmar.

Kvitteras Gefle den 28/4 1915.

J. Helsing.

Kassör.



Libroj kaj gazetoj.

Ricevita gazeto:

«**La Verda Standardo**», oficiala organ för «Hungarlanda Esperanto Societo», Red. Lógodi, utca 73. sz., I. 8. Budapest, *Ungern*. Prenumerationspris 1: 250 Sm. (2: 30 kr.).

Muzikajoj.

Saluto al Belgujo. Poezio de *H. Menalda*, muziko de *F. de Ménil*; Eld. de J. L. Bruijn, Weimarstrat 282, Hago, Nederlando. Prezo 0: 400 Sm.

La Tagiĝo. Kanto esperantista, originale verkita de *Antoni Grabowski*, kun muziko de *Baránski*. Eld. de J. L. Bruijn, Hago, Nederlando. Prezo 0: 125 Sm.

La Preĝo sub la Verda Standardo. Himno por paco, kun vortoj de *D-ro L. L. Zamenhof* kaj muziko aranĝita por kunkantado de *Harrison Hill*. Ricevebla ĉe The British Esperanto Association, 17, Hart Street, London. Prezo 0: 100 Sm.

N. E. L.

Nomaro.

de libroj pruntedoneblaj al la anoĵ de N. E. L.

Antaŭen kun kredo! Literatura jarlibro de «Pola Esperantisto» por 1911 jaro.

Orienta Almanako. Literatura aldono al «La Ondo de Esperanto» 1913.

Eĥoj el Manila. Aŭdotaj pere de originaloj kaj tradukoj en Esperanto. De Edgar A. Mc Clellan.

Grabowski, Antoni: *El Parnaso de Popoloj*.

Hertz, Henrik: *Jolanto*, la filino de l' reĝo René. Esp. Hj. J. Runeberg.

Jokai, Maŭro: *Du noveloj*.

Kabe: *Internacia Krestomatia*.

Kolovrat, Nadina: *Misteroj de amo*. Du unuaktaj originale verkitaĵ dramoj.

Luyken, H. A.: *Mirinda amo*. Romano originale verkita en Esperanto.

Luyken, H. A.: *Paŭlo Debenham*. Romano originale verkita en Esperanto.

Libraro Pacifisma, No. 5. Octave Mirbeau: *Ili estis frenezaj*. Leonid Andrejev: *Ruĝa rido*.

Literatura Aldono de Lingvo Internacia 1905.

Molière: *La avarulo*. Trad. S. Meyer.

Marchlewski, J. B., d-ro: *Ekonomio socia*. Esp. Emilo Pfeffer.

Orzeszko, Eliza: *Marta*. Rakonto. Trad. Zamenhof.

Rusinol, Santiago: *Folioj de la vivoj*. Trad. Alfonso Sabadell.

Schiller: *La rabistoj*. Trad. Zamenhof.

Spaak, Paul: *Kaatje*. Kvarakta teatraĵo. Trad. W. van der Biest. von Suttner, Berta: *For la batalilojn!* Trad. A. Caumont.

Tolstoj, A., grafo: *Princo Sebrjanj*. Trad. S-ino M. Ŝidlovskaja.

Turgenev, I. S.: *Patroj kaj filoj*. Trad. d-ro K. Bein (Kabe).

Vermandere, René: Formortinta Delsuno (Zaliger van Zon). Trad. Oscar van Schoor.

Zamenhof, L. L., d-ro: Fundamento de Esperanto.

Zamenhof, L. L., d-ro: Fundamenta Krestomatia.



Gävle Esperantoförening

Ordinarie månadmöte avhålls tisdagen den 4 april kl. 8 e. m. å kafé D' Angleterre. Efter mötet samkväm.

Konversationskurs äger rum varje söndag kl. 1/2 11 f. m. å kafé Esperanto, Drottninggat. 29. Öppen för alla medlemmar. Alla intresserade välkomna!

Föreningens **bibliotek** är flyttat till kafé Esperanto. Böcker utlånas genom kaféinnehavaren, herr Holmstedt.

Kom ihåg den pågående lärokursen! Lektioner måndagar och torsdagar kl. 8—10 e. m. i högre allm. läroverket. Ledare läroverksadj. Beckman. Obs! Även deltagare i föregående kurser äga rätt att delta.

"La Espero"

kostas por unu jaro:

en *Svedujo* 1: 20 kr.

en *Norvegujo* 1: 60 kr.

en aliaj landoj 1: 00 Sm. (1: 82 kr.).

Abonoj en *Norvegujo* estu farataj ĉe

s-ro redaktoro *H. Bonnevie*, Bergsliens gate 11, Kristiania; por aliaj landoj ĉe

La ekspedicio de La Espero, GÄVLE, SVEDUJO.

Edziĝo.

27-an de Marto 1915.

S-ro *F. W. Hipsley*, Distrikta delegito de U. E. A. por Centrosuda Anglujo, Birmingham, al f-ino *Elfrida Hellsen*, filino de s-ino Arvidson, Röhl, Smedsta, Svedujo.



Korespondado.

Italujo. — S-ro Giovanni Della Savia, Via di Toppo 11, Udine, deziras korespondadi per ilustritaj poŝtkartoj kun nordaj (kaj de la tuta mondo) gesamideanoj.

Anonceto pri korespondado kostas 40 oeroj (2 respondkuponoj).

HERRAR
EKIPERA SIG BÄST OCH
FULLSTÄNDIGAST HOS
Axel Lidholm
Drottninggatan 30 -:- GEFLE

Josef Wikströms
Tobakshandel
GEVALIAPALATSET - GEFLE

SKODON
Största sortiment hos
A. M. Zimmerman & Co

La Espero

utgives av Gefle Esperanto-förening och utkommer omkr. den 15 i varje månad.
Lösnummerpris 10 öre.
Prenumerationspris Kr. 1: 20.

Prenumeration kan ske dels direkt hos tidningens expedition, **Gefle**, dels genom återförsäljare eller på posten.

Återförsäljare önskas på varje plats! Provision om flere exemplar tagas!

Prenumerantsamlare erhålla 20 öre för varje anskaffad prenumerant, om minst 5 prenumerationsavgifter insändas samtidigt.

Esperantopapeterkartong, 25 ark brevpapper + 25 kuvert, damf. 1: 50
" d.o, d.o, herrformat 1: 65

Esperantocopiepenner, 20 öre st., 3: — kr. dussin (hårda eller lösa).

Esperantoblyertspenner, 10 öre st., 1: — kr. duss. (hårda eller lösa).

Allt franco.

Beställes hos **W. Wahlund, Gefle.**

Kiam vi bezonas
viandon, mendu
èe
FRANS A. OLSON
Telef. 34 □ GEFLE □ Telef. 34

Central- och Jernvägshotellen
GEFLE
REKOMMENDERAS!

C. J. LINDH
BOK- & DISTRIBUTIONSAFFÄR
S. FÄLTSKÄRSGATAN 19, GEFLE
Rekommenderar sig vid behov av Böcker, Tidskrifter och Häftesarbeten.
RIKSTELEFON 1697.

Prenumerera på NORRKÖPINGS
UNGDOMS-REPUBLICS tidning
ÖRNEN!
Kr. 1: 50 pr år. Minst 12 nummer
ärligen.
Begär provnummer, som sändes mot
10 öre.
LEANDER TELL, Norrköping.

Wickmans Kappaffär
NORRA KUNGSGATAN 7 - GEFLE
Vid Rådhusplanaden.
Kappor o. Promenaddräkter i stort uryal.
Beställningar emottagas o. utföras förstklassigt.
RIKSTELEFON 1391.

Gust. Holms Förstoringsanstalt
Brunnsgatan 78, Gävle. □ Tel. 1628.

Faras pligrandigojn laŭ fotografajoj.
Unuaklasa laboro. Petu prezaron!



N. Lundgren
GEFLE - Interurba tel. 151
Kamentuboj por fabrikoj.

Pli ol 800 konstruitaj.

Riparoj dum uzado.

Fulmkonduktiloj estas muntataj.

Propra brikejo en Upsala.

Plej granda firmo por konstruo de
fabrikaj kamentuboj en Skandinavio.

Argenta medalo en Stockholm 1897
, , , Gefle 1901
, , , Norrköping 1906

Prenumerera på »La Espero»!

"LA ESPERO"

Gamla årgångar av La Espero (år 1913 och 1914) finnas i ett begränsat antal och säljas till ett pris av 1 kr pr st. Varje esperantoförening ävensom varje intresserad esperantist bör äga dessa.

Lösa nummer av tidningen kunna för spridning i propagandasytte erhållas gratis av intresserade.

Tillskriv **La Esperos expedition, Gävle.**

GESAMIDEANOJ!

Faru viziton en la nova kafejo

"ESPERANTO"

DROTTNINGGAT. 29, GEFLE.

Rikstelefon 2 01.

Tie estas servata ĉiujn tagojn
kafo, teo, ĉokolado, lakto kaj
trinkajoj, ĉio kun aŭ sen pano.

Bonaj buterpanoj!

Krom tio estas vendata bona pano
de la hejmbakejo de Holmgren.

Altetime **C. G. Holmstedt.**

Carl Larssons
FOTOGRAFIATELIER
NYGATAN 34
Rekommenderas!
TELEFON 357

Från "La Esperos" Expedition, Gefle,
kan rekvireras:

Läroböcker:

Lärobok i Esperanto av

G. H. Backman 1: — + porto 0: 10

Lärobok i Esperanto av

P. Nylén 1: — + » 0: 12

Lärobok i Esperanto av

Carl Ohlsson 0: 50 + » 0: 08

(Alla med Esp.-svensk ordlista)

Esperantospråkara av

O. W. Hjartstätt ... 0: 40 + porto 0: 08

Esp.-svensk o. Svensk-

esp. ordbok av Hjart-

stätt 0: 60 + » 0: 08

Svensk-esp. ordbok av

E. L-son Finn 1: 50 + » 0: 12

Unua Legolibro av Dr.

Kabe 1: 60 + » 0: 12

Nova Testamento (mjukt

band 2: 50 + » 0: 30

Sveda Kantaro, kun me-

lodioj 0: 35 + » 0: 08

Esperantista Kantaro... 0: 75 + » 0: 04

Esperantostjarnor 0: 75 + » 0: 10

Esperantobordsflaggor 2: 40 + » 0: 30

D:o (något enklare) 1: 75 + » 0: 30

D:o (mindre) 0: 85 + » 0: 30

Esperantoflagga 0: 50 + » 0: 08

D:o (miniatyr) 0: 15 + » 0: 04

E. Liljemarks

Cigarr- och Tobakshandel

S. Centralgatan 28 och S. Kungsgatan 26

rekommanderas!

Prima varor till billigaste priser.



Samideanoj!

Med marsnumret av "La Espero" utsände vi ett upprop angående en garantifond för vårt tidningsföretag med en varm vädjan till våra vänner och gynnare att, var och en i sin mån, genom teckning av andelar bidra till vårt företags framgång.

Som synes av redovisningen i detta och föregående nummer av "La Espero" har början varit god, men ännu kräves åtskilligt innan tidningsföretaget kan anses vara tryggt. Därför rikta vi ännu en gång en enträgen uppmaning till alla och envar, som äro intresserade för vår sak och som verkligen vilja och kunna göra något, att med det allra snaraste lämna sitt bidrag. Uppskjut icke tills morgon vad som kan göras i dag.

I förhoppning om rätt förståelse av innebörden i vårt företag och våra meningsfränders välvilliga hjälp till främjandet av detsamma, teckna vi

Kun samideana saluto

Gäule Esp. förening.

Härmed rekvireras st. andelsbevis à kr,
i "La Esperos garantifond".

..... den 1915.

Namn:

Adress: